
TEA-BULTENO

22ª JARO - N°148 | MARTO - APRILO | N. 3-4/2019

Inter ĉiuj aferoj, kiujn la saĝeco alportas por igi komplete feliĉa la vivon, la absolute plej granda estas la posedo de amikeco.
Epikuro, helena filozofo (341-271/70 aK)



86a Itala Kongreso de Esperanto 24-31/08/2019 en Triesto

Patronece de

comune di trieste

Membro delle Associazioni e Club per l'UNESCO

Club per l'UNESCO di Udine

Ĉu vi jam estis en Triesto, por kongresi aŭ konferenci aŭ partopreni en la Karstaj Tagoj? Se jes, ĉu vi ne deziras refreŝigi viajn rememorojn pri ĝi, ĉeestante Italan Kongreson kaj tiel ĝuante indajn prelegojn, zorgitajn de eminentaj kaj bone konataj oratoroj, kiuj diversmaniere klerigos vin parolante pri la kongresa temo "Multkulturismo kaj pluringvismo hodiaŭ", aŭ pri la plurfaceta sciencisto, inventisto, pentristo, skulptisto *Leonardo da Vinci*? Aŭ aŭskultante opiniojn pri la lingva (mal)progresado en Eŭropa Unio? Aŭ (re)viziti la vidindaĵojn de Triesto, ĉemarajn, surkarstajn, enurbajn? Male, se vi neniam havis la eblon aŭ intencon konatiĝi kun tiu ĉi nord-orienta italia regiono, ja nun prezentiĝas ĉi okazo, kiu certe ne ripetiĝos post mallonga estonta tempo. Profitu do de la ŝanco ĉeesti neforgesotan kongreson, en aŭstra-hungara sidejo kaj samtempe admiri la urbon, ties ĉi provincon kaj regionon, kiuj ekde la unua vido vin surprizos... Do tuj aliĝu, rezervu tranoktejon, mendu ekskursojn kaj vizitojn: valoras la peno kaj vi ne pentos!

Ĉu vi permesas, ke mi flustru en viajn orelojn kelkajn sekretojn pri la interesoplena programo? Ja ĉion mi ne malkaŝos, ĉar je via alveno mi deziras aŭdi viajn mirajn "hooo"-jn ĝojplenajn.

Tutunue tamen mi deziras, ke vi konatiĝu kun la kongresejo: Savoia Ekcelsior Palace, konstruita en 1911, fronte al la triesta golfo. Jen ĝi ĉiflanke.

Sed mi daŭrigu listigante kelkajn nomojn de la prelegontoj: Seán Ó RIAIN, kiu parolos pri irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo; per Zlatko Tišljar vi ekscios pri eŭropa projekto nomata "Multlingva Ackelilo"; Nicola Minnaja oratoros pri Leonardo eĉ du fojojn, kiel same Ivan Orsini kiu esploros kun vi la demandon: *Kial ni rajtas kvalifikiĝi leonardeskaj?* Bernhard Tujder prezentos la Esperanto-Muzeon en Vieno kaj ties ĉi specialan fakon pri planlingvoj, Maritza Gutiérrez parolos i.a. pri la 500-jariĝo de Havano, dum Nan Matthias-Wang rakontos pri kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio.

Ĉu vi ankoraŭ ne plene posedas la esperantan lingvon? Ĝuste por vi Dalia Pileckiene gvidos progresigan kurson, dum por via edz/in/o, amik/in/o kiuj ĝis nun ne emis studi ĝin, jen la porkomencanta kurso kun Anna Löwenstein.



Ĉu la prelegoj estas troaj por vi kaj vi ŝatus iom vagadi tra la urbo, sed kun ĉiĉerono, por kompreni pli bone la historion? Ni proponas promenojn laŭ tri diversaj itineroj: Novstila arkitekturo kaj historiaj kafejoj; Familiaj rezidejoj; Diverskultaj preĝejoj: Sinagogo, preĝejoj serbo-ortodoksa kaj orient-greka, katolika Baziliko Sankta-Antono. Kien ni iros en la regiono? Ni vojaĝos al Romiaj tempoj: *Aquileia*; al Longobarda epoko: *Cividale del Friuli*; al Mezepoko: *Gemona* kaj *Venzone*; al 1800-aj jaroj: *Gorizia*.

Ĉu tio ne sufiĉas? Kial do ne resti iom da tempo post la kongreso: En programo estos metita ankaŭ tiu ebleco. Jam en sabato, la lasta aŭgusta tago ni enŝipiĝos kaj navigos la Adriatikan maron direkte al *Grado*, venecistila urbeto, kaj insulo *Barbana*.

Pripensu, pripensu, kaj nepre aliĝu! **LKK**

Jara Asembleo - Trieste, 17 februaro 2019

Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocianoj, karaj geamikoj,

Bonan tagon kaj bonvenon al tiu ĉi tradicia rendevuo, dum en kiu ni resumos la faritaĵojn kaj klopodos kunmeti plurajn agadojn kaj daŭrigi en nia laboro favore al Esperanto kaj al nia asocio.

Elkoran bonvenon al la geamikoj el la Esperanto-Societo de Rijeka, kiuj ankaŭ ĉi-jare venis por nia jarkunveno, sed estas aparte granda plezuro saluti kaj bonvenigi Martin-Stuppnig-on, kiu post longa tempo denove kaj finfine venis por tiu ĉi nia speciala kunsido. Li kutimis partopreni en ĝi, ja li estas ne nur bonega amiko sed ankaŭ nia **honora membro**, sed pro diversaj motivoj li ne povis. Kaj jen ni denove kune en tiu ĉi sidejo por la jara asembleo de nia Asocio. Estas bone, ĉu ne? Tiu ĉi fakto povas multon signifi: ke ni persone fartas sufiĉe bone, ke nia grupo vivas, ke ni ankoraŭ sukcesas pagi la elspezojn por tiu ĉi sidejo.

Verdire nia grupo devus pli prosperi, ne simple vivi aŭ viveti, ĉar TEA malgraŭ siaj 113 jaroj povas ankoraŭ sukcese labori por esperanto en Triesto kaj en nia Regiono. La vivo fariĝis ĉiam pli komplika, malfacila. Kunmeti interesan agad-projekton postulas fantazion, multegan laboron kaj bedaŭrinde financajn rimedojn. Kaj mi ne menciis la alian bezonatan ingrediencon: novajn kaj laŭeble plurajn fortojn por - kiel ofte diris nia multjara Prezidinto Renato Bisi - *pluporti la torĉon de nia internacia lingvo kaj de la idealoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof*. Se TEA ne tiom junetas, ankaŭ ĝiaj asocianoj grandparte ne plu estas junuloj.

Niaj vicoj mallongiĝis; certe vi memoras ke antaŭ jaroj la jara asembleo estis sufiĉe brua, gaja kaj vigla pro bela nombro da partoprenantoj. Nun la situacio estas tiu kiun vi havas subokule: tamen ni estas kontentaj ĉar inter ni troviĝas kelkaj novaj membroj, junaj personoj kun granda entuziasmo, kies nomojn mi volas citi: Mirko Nikodimovich, Giampaolo Tomasi kaj Peter Grbec. Ili reprezentas la novajn fortojn kaj mi havas grandajn esperojn je ilia kunlaboro por renovigaj labormetodoj, informado, lanĉo de novaj iniciatoj kaj…. ktp.

Pasintjare Itala Esperanto-Federacio proponis al ni organizi en Triesto la 86^{an} italan kongreson de Esperanto dum la lasta semajno de aŭgusto. Ni akceptis. Por mi ĝi estos la lasta grava aranĝo, poste mi aktivos nur loke. Ja estas alveninta la momento transdoni al pli junaj homoj la taskon daŭrigi la agadon komencitan dank' al multaj sindonemaj personoj por la disvastigo de la internacia lingvo esperanto. Ni kune faris multon, ne imageble kiom multe, kvankam ni ĉiuj certe eĉ ne tro bone memoras pri tio ĉi. Nia grupo ĉiam distingiĝis en la granda areo de Esperantujo kaj estas bone konata preskaŭ en la tuta mondo. Kompreneble, la aŭspicio estas ke TEA daŭre agadu en la venontaj jaroj, same aktive kaj sukcese kiel ĝis nun, ke ĝia engaĝiĝo ne haltu, ke tiu ĉi sidejo estu plena je novaj esperantistoj, ke ĉio flugu alten kaj sukcese.

Dum la pasinta jaro ni daŭrigis la kunlaboradon kun aliaj kulturaj lokaj asocioj, kaj multe pli povintus okazi, se ni havus la fortojn por tion fari.

Instruado kaj pritraktado de Esperanto, okazigo de sideja programo tro ofte bedaŭrinde estis limigitaj al malmultaj personoj. Kiel ofte mi diris, niaj vicoj reduktiĝas pro diversaj kialoj: aĝo, sano, aliaj plurspecaj okupoj. Partopreno en niaj kunvenoj estas ege utila por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesa por lingva ekzercado. Ĉu la vespera vendreda programo fariĝis malpli alloga? Se jes, bonvolu proponi, sugesti kaj kompreneble partopreni kaj eĉ mem prizorgi. Se vi povas, volas, deziras kunlabori, anoncu vin, ĉeestu la programerojn kaj helpu nin plilarĝigi la membraron kaj renovigi la gvidorganojn. Cetere ĝuste pri tiu ĉi lasta temo, hodiaŭ, vi havos la eblecon uzi vian membrecan povon.

En la antaŭa jarkunveno, mi vokis kiel kutime al kunlaboro kaj renovigo favore al novaj elpaŝoj kaj sukcesoj. Denove mi tion faras, ĉar maltrankvilo pri la estonteco sentiĝas: se ĉiu el ni disponigos al TEA tempon (iom da!) kaj entuziasmon, kredu, ni povus realigi multe.

Antaŭ ol transiri al la sekretaria raporto, mi deziras substreki la gravecon de tiu ĉi jaro por nia asocio: en la monato de aŭgusto okazos en nia urbo la 86^{a} itala kongreso, en kiu ni supozas - kaj esperas - partoprenos pli ol 200 personoj el minimume 20 diversaj landoj. Estos tre riĉa kongreso pro la interesaj temoj pritraktotaj kaj pro la belaj vizitoj kaj ekskursoj. Ni ŝatus ke la kongresanoj rememoru dum longa tempo tiun ĉi eventon en Triesto kaj sopiru je baldaŭa reveno inter ni, por iom pli bone konatiĝi kun la urbo kaj ĝia belega ĉirkaŭaĵo. Pro tio, ĉiu ebla kunlaboro estas bezonata kaj mi invitas vin al sinpropono.

Post iom longa parolado, venas la momento por transdoni la podion al la diligenta Segretario. Dankon por la atento!

Vivu TEA kaj Esperanto!

Edvige Tantin Ackermann

Agadaporto de la sekretario

Tre estimataj Gastoj
kaj karaj TEA-anoj!

Bonvenon al la Jara Asembleo, dum kiu oni priparolos la faritajn agadojn de TEA.

Januare (26ª): TEA ricevis la peton de Germana Biblioteko Aalen, tra ties prizorganto Utho Maier, sendi malnovajn ekzemplerojn, mankantajn, de La Eta Gazeto kaj de preskaŭ ĉiuj TEA-Bultenoj. Post iom da laboro, danke ankaŭ al la helpo de Elio Nocent, oni finfine sukcesis sendi la deziratan materialon.

Februare (24ª): Enkadre de la Tago de Patrina Lingvo, okazis en Salono *Beethoven* koncerto de Korusoj, inter kiuj la slovena Koruso *Grbec*. TEA, kunlabore kaj partnere kun kvin korusoj kaj la asocio "”Amikoj de la Muzika Junularo”, ene de projekto nomita "Sep notoj por la paco”, prezentis plurlingvan kantoprogramon: la aranĝo ricevis la subtenon de Regiono FVG. E.Ackermann estis intervjuita telefone de ĵurnalisto de RAI.

Marte (6ª): Klasoj de mezgrada lernejo de Muggia kun instruistino venis al Trieste, en la salono apud la sidejo de *ANTEAS*, en Piazza Dalmazia: al tiuj lernejanoj Ackermann prezentis Esperanton.

Marte (22ª) kaj **Maje (24ª):** organize de la Asocio *ANTEAS* pri civila volontulado, oni prezentis Esperanton kaj ties movadon al kelkaj klasoj de la 'Lernejo IAL' en strato *Pondares*.

Junie (8-10): Oni partoprenis en la 20ª AlpAdria Konferenco okazinta en Bjelovar (Kroatio). La sekretario de AAK, Ackermann, prezentis la situacion de tiu ĉi organizo, estis diskutitaj planoj pri estonta aktivado kaj prezentitaj novaj ideoj. Neniu proponis sin por organizo de la venontjara AAK-o: oni atendas kandidatojn.

Julie: Startis Projekto BITOTEKO, fare de Daniele Binaghi, Antonio de Salvo kaj Daniela Rossetti: ĝi temas pri cifereca biblioteko pri Esperanto en Italujo, subtenita de IEF. Ĝi permesas, arkivi, konservi kaj disponigi materialon, kiel tekstojn, libretojn, kaj ĉefe ĵurnalojn, publikigitajn diversloke en nia lando. Ankaŭ TEA kunlaboras en tio, pere de E. Doerfler, kiuj prenis sur sin la taskon enirigi en la virtualan bibliotekon la TEA-Bultenojn, ekde 1998 ĝis la nuna jaro.

Oktobre (15ª): Ankaŭ en 2018 ni ricevis de la FONDAĴO BIBLIOTEKO APOGO BACHRICH – UEA - 7 laste eldonitajn Esperantajn librojn. Estas granda elekteblo en nia biblioteko, danke ĝuste al la subteno de Bibliotekaj Fondaĵoj.

Novembre (12-15): Marija Belošević denove organizis tre interesan Seminarion, en kiu aktive partoprenis Ackermann. Temis pri "Memorialo honore al Lucija Borčić". Okazis premiado de Tradukkonkurso, prelegoj pri traduk-ado, koncerto ka. Oni vizitis plurajn Zagrebajn monumentojn kaj ankaŭ la lokan tombejon, kie ripozas multaj eminentaj zagrebaj geesperantistoj.

Decembre (14ª): Kiel tradicie oni festis la naskiĝdatrevenon de nia Majstro. Estis prezentita ankaŭ serio da fotoj, pri Zamenhof kaj ties ĉi familianoj. La kunvenintoj ne estis multnombraj sed certe gajaj kaj ŝercemaj.

Pri tradiciaj renkontiĝoj: Maje ni vizitis, kune kun la geamikoj el Rijeka, la vidvinon de nia kara Marĉelo Trampuh en Kaštelir. En la sama monato, en la TEA-sidejo estis organizita festo por Amalia Zerpini, kiu 90-jariĝis, dum en julio denove alia festo por la 90ª naskiĝdatreveno de Anita. Al la asocio, en 2019, petis aliĝon du esperantistoj: Alberto Muzzu kaj Giampaolo Tomasi. Ili atendas vian aprobon.

Esperantistaj gastoj en Trieste: dum la jaro vizitis nin Carlo Meloni, el Telavivo, Israelo; Didier Izacard, el Germanio; Eŭgeno De Zilah, el Francio; Michela Lipari el Romo.

Pri kongresoj/konferencoj: Aprile, 20ª AlpAdria Konferenco en Bjelovar: ĉeestis Laura, Edvige kaj Elda; julie, UK en Lisbono: partoprenis triesta ina kvinopo; aŭguste/septembre, la 85ª Itala Kongreso en *San Marino*: Elda kaj Laura.

Septembre, suna vetero permesis al ni partopreni en **la Festo de Amikeco** sur la Trilanda Pinto, kie bonvenigis nin Martin Stuppnig kaj slovenaj gesamideanoj.

Pri ekstera informado: Kiel kutime **anoncoj kaj informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke, estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj, ĵurnaloj, sed precipe perrete.

Mirko Nikodimovich daŭrigas la aktualigadon de la TEA-retejo www.esperantotrieste.altervista.org - konsilindas ties vizito! Plie li iĝis kunlaboranto de la FEI-skipo okupiĝanta pri la enigo, en la ttt-ejon kongreso2019.esperanto.it, de la diversaj informoj/datenoj rilataj al la 86ª Itala Kongreso de Esperanto.

Kun la revuo *Insieme Volontariamente*, eldonita de Centro pri volontula servado kaj aperanta ĉiun trian monaton (kvarfoje jare), E.Ackermann kunlaboras per artikoloj pri 'Esperanto'.

Komence de oktobro, antaŭ la starto de la nova kurso, E. Ackermann havis intervjuon ĉe la radio, dum kiu ŝi menciis ankaŭ la okazontan kongreson.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la alirprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 6 elsendoj pri diversaj temoj. ➔


Estonteco, kiu lernos lingvojn?

2a parto (1a parto-TEA-Bulteno jan-februaro).

La artikolo pri lingvoj malaperontaj finiĝis per la alarmkrio de la "Akademio de la Crusca"* [elp: Kruska], kiu tion ĉi diras interalie: "Ene de la 2050ª jaro ni uzos la duonan parton de la ekzistantaj italaj vortoj." kaj "... en 2300 ĝi povus entute malaperi".

Do, tre pripensindaj anoncoj, ĉu ne? Sed indus esplori la kialojn de tiu ĉi katastrofo, ĉar ja temas pri vera katastrofo. Kiaj aŭ kiuj la kaŭzoj? Ĉu komputilo mortigos la lingvojn kaj tradukistoj ne plu necesos? Ĉu vere la itala malaperos, kaj kiu estos la plej parolata lingvo en la mondo? Ja multegas la demandoj! Laŭ datumoj donitaj de iu instituto pri lingvistiko el *Dallas*, en Teksaso, foriĝos el la ĝis nun ekzistantaj 7000 lingvoj almenaŭ 1400.

Oni devas pensi, ke pri ĉ. 900 idiomoj la gepatroj ne plu kapablas instrui sian lingvon je



elementa nivelo al siaj infanoj. Ekzistas krome 199 kiuj estas parolataj nur de kelkdeko da personoj. Sed kiu fino trafos la italan? Kiel jam anoncite, ene de 2050 la itala vortaro, konsistanta el 270 000 vortoj, reduktiĝos je la duono. Jam en 2017 la prezidanto de la Kruska-Akademio lanĉis averton: malaperos la subjunktiva kaj futura verboj, kaj pluraj vortoj estos anstataŭigitaj per fremdaj vortoj.

Eble la malapero de subjunktivo aŭ futuro feliĉigos multajn, precipe studentojn, kaj ne perturbos ies ajn dormon, tamen tio estos sendube la komenco de la... fino!

Kio tamen pleje estas timiga? La malapero de lingvoj anstataŭitaj de idiomo sen identeco! Do ni vidu, kio okazos al la itala!

Kian italan lingvon oni parolos post ĉirkaŭ 30 jaroj? La akademianoj, analizinte la tendencon kaj la evoluon de la lingvo en mia lando, opinias, ke ĝi pli kaj pli iĝos simpleca, angleca kaj malklereca. La lingvaĵo fariĝos malriĉvorta, sensuka, ne plu estos sekvata la humanisma tradicio grek-latina, kiu estis firma bazo de nia kulturo. Jam nun estas evidente, ke la humanisma dimensio de kulturo estas malaperanta, la homo ne plu estas la centro de la kreitaro, dum aperas novaj teknologiaĵoj, en kies kunteksto la homo senvaloriĝadas. For la subjunktivon, for la futuron - pli simplas uzadi prezencon; pli kaj pli en konversacioj, prelegoj, lecionoj, ĵurnaloj, libroj k.a. abundos allingvaj vortoj, precipe tiuj apartenantaj al la interretaj retejoj kaj - ho, kiel bele! - niaj frazoj estos punktitaj per tiuj stultaj *emoticon* (miensimboletoj) kies celo estas tuj atentigi la leganton pri propra animstato. Ni esprimos nin per tiu mallongigita lingvaĵo, kiun oni uzas por mesaĝoj, interrete kaj per saĝtelefonoj, miksante literojn, numerojn kaj simbolojn.



Neniu ankoraŭ sukcesas certe antaŭvidi la estontecon de lingvoj. Sendube ekaperos ia miksaĵo de idiomoj - onidire - kaj ekestos granda Babelo en kiu ekzistos vortoj, rapide disvastiĝontaj, kiuj entrudiĝos en ĉiun alian parolatan lingvon.

Jam konatas *globish*, tiu simpligita angla lingvo *(n.d.r.: Kion opinius pri ĝi Shakespeare?)*, senpersoneca, senkaraktera, kiu povus permesi al ni interkomuniki tuje, sen bezono de tradukado de unu idiomo al alia, kiu forvišos ritmon, nuancojn, tradiciojn kaj lokajn aŭ naciajn kulturojn. Unuvorte: platiĝo kultura, senta, idea.

Kun la tempopaso povus enradikiĝi la uzo de la tiel dirita *spanglish*, angla-hispana koktelo, jam tre laŭmoda en Usono kaj jam nun parolata de ĉ. 40 milionoj da personoj.

Konsidere tamen la popolan plinombriĝon, laŭ spertuloj la plej parolata lingvo en 2050 povus esti la franca, kaj ne la ĉina, araba aŭ angla lingvoj. La plialtiĝo de la nombro de afrikanoj, kiuj en tiu jaro jam estos ĉ. du miliardoj kaj duono, povus renversi tiajn prognozojn, ĉar la francparolantoj pliiĝos de la nunaj 300 milionoj ĝis pli ol 800 milionoj.

Kaj en tiu ĉi senorda, plenkaosa situacio, kian ➔

➔ **Ĝeneralaj informoj:**

TEA-Bulteno: senhalte la ses-paĝa asocia informilo aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

Estrarkunsidoj: dum la jaro oni kunsidis 3-foje, sed konstantaj estas la interrilatoj, precipe pro la organizado de la Itala Kongreso.

Korespondado: en papera versio estis ricevitaj/senditaj eĉ ne dek (paper)leteroj; retaj mesaĝoj senditaj/ricevitaj estis pli ol cent, sen enkalkuli la prikongresajn korespondaĵojn pri la itala Kongreso. La mesaĝoj troviĝas en kompakta disko en la koncerna ujo pri "Korespondado 2018". Dankon pro via atento.

Elda Doerfler

Nova retejo de UEA en Simpla Esperanto

La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas uea.facila, kaj ĝi estas videbla ĉe: https://uea.facila.org. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la E-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj", kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de KONTAKTO, nun revizita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, ne ofte bezonataj en tia retejo. La vortlisto troviĝas ĉe: https://uea.facila.org/vortlisto/

La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein, kiu ekrilatis kun ILEI kaj Stano Marček, la redaktoro de ties revuo JUNA AMIKO. Ĉi projekto estas subtenita de Emilio Cid, UEA-estrarano, kaj subvenciita de ESF. Jen pozitiva kunlaborado.

Gazetaraj Komunikoj de UEA - N-ro 780

➔ rolon havos la maŝinoj, la komputiloj, la robotoj? Ĉu ili komplete malaperigos la "homajn" tradukistojn kaj sukcesos forfaligi la lingvajn barojn?

Ĉu povas konsoli vin, ke - laŭ la fakuloj - ili estos konsideritaj nur necesaj helpiloj kaj ke la art-inteligenteco kaj teknologio, eĉ la plej avangardaj, restos ĉiam unu paŝon malantaŭe al tiu homa?

Ĉu ni kredas, aŭ ne, al tiu ĉi konkludo, la nura penso pri malapero de iu ajn lingvo estas suferiga por ĉiu ajn, kiu konscias pri la grava valoro kaj signifo kiu enestas en ĉia idiomo, kiel ajn grandnombra estas ĝia parolantaro.

ElDo

* Noto: La Akademio de la Crusca estis fondita en 1583, en Florenco. Ĝi estas la plej malnova lingvo-institucio. Ĝia tako estas la konservado kaj renovigo de la antikvaj tradicioj en leksikografio; traserĉado en kampoj historia-lingva, dialektologia, filologia, gramatika kaj leksikografia; evoluado kaj aplikado de la novaj informatikaj teknologioj necesaj por plua esplorado kaj por pli facila konsultado de la propra havaĵo arkiva kaj bibliografia. La itala institucio arigas studemulojn kaj fakulojn pri lingvistiko kaj filologio de la itala lingvo.

Marta Programo

1a, vendredo	20h00 - Legado de la verko de Aleksander Korĵenkov - *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.*
4a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - 9 minutoj kun....
5a, mardo	Ne okazos la kurso de esperanto
8a, vendredo	20h00 - Bildoj pri Koreio
12a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
15a, vendredo	20h00 - Ni krucvortumu!
19a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
22a, vendredo	20h00 - Portugalujo en bildoj
26a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
29a, vendredo	20h00 - LA MAGIA LANDO, filmo de la Laŭzana Esperanto-societo

Aprila Programo


2a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
5a, vendredo	20h00 - Legado de la verko de Aleksander Korĵenkov - *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.*
9a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
12a, vendredo	20h00 - Pri la 86ª Itala Kongreso
16a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
19a, vendredo	20h00 - La Akuzativo: nia turmento!
23a, mardo	18h00/20h00 - Unua– kaj duagrada kursoj
26a, vendredo	20h00 - Ni krucvortumu!



Aforismoj

Libroj servas por pruvi al homo, ke tiuj liaj ideoj tiel originalaj tute ne estas novaj.

Abramo Lincoln (1809 - 1865)



Neniu, kiu vere mastrumas sian lingvon, rajtas superregi alian.

George Bernard Shaw, irlanda verkisto (1856-1950)

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; 20-22; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2018 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina 90012340320